# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



„ABUNDO" — PENTRAĴO DE G. LOZEV

7

SOFIA — JULIO 1961

# ENHAVO

| | Paĝo |
|---|---|
| * * — La esperantistoj — en la unuajn vicojn | 1 |
| * — Al plenumo de la decidoj de la 34-a Kongreso | 3 |
| La necesan atenton al la membrokotizo . | 6 |
| **Banĉo Banov** — Rivero kaj torento | 8 |
| Rezultoj de la unua etapo de la organiza konkurado . | 9 |
| C. **Murgin** — La unua „purigo" de Bulgara Esperantista Asocio en 1927 | 10 |
| V. **Oljanov** — La Hispana civilmilito kaj la esperantistoj en Varna | 14 |
| D-ro Al. **Dajski** — Bulgario — lando de mineralakvaj fontoj kaj banlokoj | 15 |
| ORGANIZA VIVO | 16 |

*Abonkotizo : jara — 14 levoj, duonjara — 7 lv. Por eksterlando — 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro.*

*Reklamtarifo : 5 levoj por cm²; korespondanoncoj: 0,5 levoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 1000 lv.*

**LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO"**

**ALBANIO:** Inĝ. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

**ITALIO:** Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

**KOREO:** Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

**NEDERLANDO:** Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

**RUMANIO:** Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucureşti 5

**SOVETUNIO:** J. Kudrjavickij, PK 1255, Moskva K-9.

**SVEDIO:** Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JULIO 1961
7
JARO XXX

# LA ESPERANTISTOJ — EN LA UNUAJN VICOJN

*La plejmulto de la bulgaraj esperantistoj jam ek de la unuaj jaroj de la enlanda movado ĝis nun ĉiam laboris, strebis kaj pli alten celis en la batalo de la progresemaj kaj avangardaj fortoj de niaj lando kaj popolo. Ligite intime kun sia popolo, nedisŝirebla ero de ĝia karno kaj sango, partoprenite aktive en la kontraŭfaŝista batalo kaj nun kontribuante en la konstruado de la socialismo, la esperantistoj kaj ties laboro estas rekonataj de nia tuta socio. Tiu elmontro de socia rekono estas ŝuldata precipe al tio, ke la bulgaraj esperantistoj agis kaj agas senbrue, sisteme kaj konstante kiel konsekvencaj patriotoj kaj internaciistoj sur la kultura kaj ekonomia kampoj. Per sia poresperanta kaj peresperanta agado ili seninterrompe pruvis la utilecon de la internaciaj ligoj sen posedado de malfacilaj fremdaj lingvoj, same en la konstruado de la socialismo en nia lando kaj por daŭra paco en la mondo.*

*Por helpi per siaj modestaj fortoj en la efektivigo de tiuj noblaj celoj, la bulgaraj esperantistoj kaj ties Asocio partoprenas aktive en multaj naciaj kaj internaciaj manifestacioj kaj aranĝoj kiel eldono de libroj kaj revuoj, organizo de individua kaj kolektiva korespondado kaj kontaktoj, diskonigo de la grandaj sukcesoj de nia popolo laŭ la vojo de la socialismo en eksterlando ktp.*

*Ni ne dubas, ke ankaŭ estonte ni scipovos organizi tiun nian agadon ankoraŭ pli bone, ankoraŭ pli vaste, subigante ĝin al la ĉefaj postuloj kaj bezonoj de nia socialisma patrio.*

*Estas konate, ke sub la gvidado de Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio, la laboruloj en nia lando sukcese plenumis la trian kvinjaran planon laŭ la nivelo de la produktado nur en daŭro de tri jaroj (1958—1960). Tio estas grava evento, kiu pruvas la pravecon de la politiko de plirapidigita ekonomia disvolviĝo de nia lando.*

*La plej rimarkinda sukceso de la socialisma konstruado en nia lando en la periodo de la unua, la dua, kaj parto de la tria kvinjaraj ekonomiaj planoj estas la kompleta socialisma reorganizado de la agrikulturo — grava fonto de nutraĵoj kaj samtempe krudmateriala kaj merkata bazoj de la industrio. En sia raporto antaŭ la plenkunsido de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio pri la problemoj de la agrikulturo, okazinta en aprilo ĉijare, k-do T. Jivkov diris: „Nia linio estas kaj devas esti — pligrandigi la produktivecon de la laboro, malpligrandigi la elspezojn de produktado de la agrikulturaj produktoj, certigi pli multe kaj pli malmultekostajn produktojn de la agrikulturo. Tiu estos la sola vojo por la plua plifirmigo de la kooperativa sistemo, por plifortigo de la ekonomio de la lando kaj por la plibonigo de la bonstato de nia tuta popolo".*

*La plenkunsido pridiskutis, aprobis kaj akceptis decidojn kaj entreprenojn pri vico da problemoj por la plua sukcesa kaj rapida disvolviĝo de nia socialisma agrikulturo. La plej gravaj el ili estas: pri la plialtigo de la nivelo de la agrikulturo kaj la pligrandigo de la agrikultura produktado; pri la ĉiuflanka plibonigo de la laboro en la bestbredado, por decida pligrandigo de la produktado de viando, lakto, ovoj kaj lano; pri plua plivastigo de la mekanikigo de la procesoj de la agrikultura produktado, pri kompleksa mekanikigo de la agrikulturo; pri plialtigo de la produktiveco de la laboro en la agrikulturo; pri produktado de pli malmultekostaj produktoj; pri plibonigo de la organizado kaj gvidado de la terkulturaj laborkooperativoj; pri iuj problemoj de la agrikultura scienco ka.*

*Por efektivigo de tiuj taskoj, kiel sciate, en nia lando nun entuziasme laboras la anoj de la terkulturaj laborkooperativoj, la agrikulturaj specialistoj, nia tuta laborula popolo. La esperantistoj ankaŭ ne restas mulantaŭen, precipe la esperantistoj en la vilaĝoj. Bonan ekzemplon tiurilate montras niaj kamaradoj-esperantistoj en vilaĝo Borima apud Trojan. La prezidanto de la loka Esperanto-societo k-do Stojĉo Ŝoŝkov estas samtempe vicprezidanto de la Terkultura Laborkooperativo, la plejmulto de la brigadestroj estas ankaŭ esperantistoj. Ili ĉiuj aktive partoprenas en la organizo kaj la plenumo de la taskoj en la kooperativo, eluzante ĉiujn rezervojn kaj eblojn por la pligrandigo de la agrikultura produktado. Krome ili multon kontribuas por la kreo de pli intensa kultura vivo en la vilaĝo, organizinte vastan internacian korespondadon kaj ligojn kun eksterlando. La esperantistoj en vilaĝo Borima laboras fervore en akordo kun la loka organizaĵo de la Patrolanda Fronto kaj la ceteraj amasaj organizaĵoj. Tiu agado de la societo estas digne pritaksata de la lokaj kaj regionaj aŭtoritatoj kiel utila kaj imitinda, kaj pro tio ili helpas senrezerve al ĉiuj aranĝoj de la loka societo, kiu lastatempe iniciatis la organizon kaj konstruon de Esperanto-tendaro meze de mirinde belega ĉirkaŭaĵo. Tiel laboras la esperantistoj ankaŭ en kelkaj aliaj lokoj de la lando. La plejmulto el la societoj kaj apartaj esperantistoj tamen ne ĉiam utiligas ĉiujn eblaĵojn por plirezultodona por-kaj peresperanta laboro. Ili ankoraŭ ne scipovas ligi sian poresperantan laboron kun la grandaj kaj gravaj aktualaj taskoj de la akcelita ekonomia disvolviĝo de nia lando.*

*Nun en la tuta lando sub la gvidado de la Partio kun nova forto kaj impeto kreskas la tutpopola movado por la plenumo de la planoj en reduktitaj templimoj por rapida disvolviĝo de landekonomio laŭ la vojo de socialismo. La esperantistoj kaj Esperanto-societoj plej bone plenumos sian patriotan devon, se ili tuj senprokraste aliĝos al la penoj de nia popolo por sukcesa plenumo de tiu nobla tasko. Ili devas sin enmeti en la diversaj laboriniciativoj, kiujn organizas la komitatoj de la Patrolanda Fronto kiel plantado de la arbetoj, laborbrigadoj por terkulturaj laborkooperativoj, kolektado de akcesoraj produktoj, kolektado de drogherboj, fungoj ktp. Per tiu sia agado la esperantistoj helpos al la popola ekonomio kaj samtempe ili helpos por la plifortikigo de la financa stato de la societoj. Paralele kun tio oni povas utiligi tiujn ligojn por la propagando de Esperanto en neesperantista medio. Por diskonigi tiujn agadon kaj aranĝojn de la lokaj societoj kaj por interŝanĝo de sperto „Bulgara Esperantisto“ publikigos ĉiujn korespondaĵojn kaj materialojn en ligo kun tio.*

*Al laboro, gekamaradoj, por pluaj sukcesoj en nia ĉiutaga agado por la finkonstruo de la socialismo en nia lando!*

# AL FINPLENUMO DE LA DECIDOJ DE LA 34-A KONGRESO DE BEA

(El la raporto, legita de V. Oljanov en la plenkunsido de CK de BEA, okazinta la 3-an de junio 1961)

Sen firma asocia disciplino ni ne povas plenumi niajn taskojn. La Kongreso devigis nin „priatenti pli serioze la stabiligon kaj la plifirmigon de la organiza stato de nia Esperanto-movado, enpraktikigi fortan organizan disciplinon“ (art. 2 de la kongresa rezolucio). Regule en kunsidoj la societaj estraroj devas pridiskuti la dokumentojn de CK kaj preni decidojn pri plenumo de la taskoj.

Unu el la plej pozitivaj signoj pri la organiza stato de la societoj estas la pago de la kotizo al la asocio. Por plifaciligi la societojn kaj la membrojn la asocia administracio akceptas la kotizon po trimonatoj. Malgraŭ tio malmultaj estas la organizaĵoj kiuj regule kotizas al la asocia kaso. Por la unua trimonato pagis nur 36 societoj por entute 1448 membroj, aŭ 28,57% el ĉiuj s-toj. Estas s-toj, kiuj atingis kaj superis la planitajn ciferojn pri la nombro de la kotizintaj membroj (vidu la tabelon de la organiza konkurado!). Tiaj grandaj kaj mezgrandaj societoj kiaj tiuj en Varna, Jambol, Blagoevgrad, Petriĉ, Goce Delĉev, Târnovo kaj multaj aliaj ĝis nun nenian membrokotizon pagis al la asocio por tiu ĉi jaro. La plej granda societo en la lando — „M. Gorkij“ en Sofio, nombranta 400 membrojn, kiu devas servi kiel modelo elŝuldigis nur 74 membrojn. La sofiaj s-toj „Printempo“ — de la urbtransportaj oficejoj, „Heroldo“ de la poŝtistoj kaj la studenta „Vela Peeva“ ankaŭ ne pagis kotizon.

Delonge ni rekomendas al la grandaj kaj mezgrandaj s-toj dividi la membrojn je grupoj ĉu laŭ la loĝo, ĉu laŭ laborloko po 15—20 personoj kun grupestroj. La grupestroj faras sciigojn de la estraro, kolektas la membrokotizon, varbas abonantojn. Per tia strukturo oni stabiligos la organizaĵon kaj ĉiuj aranĝoj estos plenumataj ĝustatempe kun maksimuma partopreno en ili de la membroj. Pruvita vero de la organiza vivo estas, ke se ni volas ke la aferoj marŝu senbremse, ke la membroj konstante sentu sian membrecon kaj ne forgesu sian organizan devon, oni devas distribui la laboron inter pli multe da aktivuloj, regule doni al ili taskojn kaj kontroli ties plenumon. Malgraŭ la evidentaj avantaĝoj de tiu ĉi sistemo malmulte da s-toj ĝin akceptis kaj aplikas. Eĉ la sofia s-to „M. Gorkij“ ĝis nun ne aplikis ĝin, malgraŭ ke ni donis al ĝi instrukcion pri tio kaj ne unufoje estas proponata en ĝeneralaj kunvenoj. Kaj ne mirinde, kial ĝi malfacile kolektas la membrokotizon, ne varbas sufiĉe da abonantoj por la asocia organo. Kompreneble la kasisto sola ne povas ĉirkaŭiri ĉiujn 400 membrojn disigitajn en granda Sofio en diametro de 20 km.

Alia grava signo pri la nivelo de la organiza laboro estas la nombro de la abonintoj al la asocia organo. Tiun ĉi jaron ni havas pli ol 2300 abonintojn aŭ per 600 pli ol dum la pasinta. Sed se ni konsideras, ke la asocio nombras ne malpli ol 4000 membrojn, tiu cifero tute ne povas nin kontentigi. Ne foje ni evidentigis la signifon de la asocia organo. Per ĝi CK donas direktivojn pri la agado de la s-toj, tie oni publikigas ĝiajn decidojn kaj sciigojn, „Bulgara Esperantisto“ informas plej vaste pri la movado en la lando kaj en la mondo, prezentas belliteraturajn materialojn en Esperanto, lingvajn demandojn, el la historio de nia movado ktp. Kvazaŭ pasis jam la tempo, kiam oni devis konvinki la aktivularon, ke ĝi ne povus gvidi la lokan movadon, se ĝi ne ricevas regule nian organon. Nun

* La ciferoj rilatas al 31. 5. 1961.

ni devas konvinki ĉiun esperantiston ricevadi ĝin. Sed kion ni devus diri pri tia societo kia „Albatro“ en Varna kiu havas entute 5 (pervorte — kvin) abonintojn al BE! Nur la membroj de la estraro kaj de la kontrola komisiono estas 10. La komentarioj superfluas. Ne hazarde tie ne marŝas la organiza laboro, ne hazarde la movado perdis la konkeritajn antaŭe poziciojn en tiu grava industria kaj somerrestadeja urbo. Pri la sama problemo la estraro de „Albatro“ estis kritikata en la kongreso, sed la kamaradoj ne prenis noton. Tie estas ankaŭ membro de CK — k-do Georgi Dimov. Kiel li rilatas al tiu granda manko? Kaj kia estas la agado de iu membro de CK, se eĉ la s-to en kiu li membras apenaŭ vivetas?

Pri la subtakso de „Bulgara Esperantisto“ fare de estraroj elokvente parolas la jenaj ciferoj: la poŝtista s-to en Sofio „Heroldo“ havas nur 12 abonintojn, la fervojista (Sofio) — 15, „Printempo“ (Sofio) — 2, studenta „V. Peeva“ — 3, Kârĝali — 6, Teteven — 2, Preslav — 1, Berkovica — 3, Lom — 1, Kubrat — 1, Bjala — 1, Madan — 1, Drjanovo — 1. Nur kelkaj estas tiuj estraroj, kiuj komprenis la veran signifon de la kampanjo por varbado de abonintoj kaj atingis bonajn rezultojn. Inter ili ni menciu: Burgas, Stara Zagora, Polski Trâmbeŝ, Dimitrovgrad — „Flamo“, Loveĉ, Stanke Dimitrov, Vraca, Ruse — „Dimitrovec“, Levski. Ni esprimas laŭdon al tiuj ĉi societoj. Ilian sperton devas pristudi kaj apliki la aliaj urbaj kaj vilaĝaj societoj.

Konklude ni povas diri, ke la nesufiĉa nombro de la abonintoj al BE estas ŝuldata precipe al organizaj mankoj. Grandan parton en tiu manko havas la nekompreno de iuj estraroj pri la organizanta rolo de la gazetaro. Pri la nesufiĉa nombro kompreneble kontribuas ankaŭ iuj mankoj en la redaktado de nia organo. Post la kongreso ĝi pliboniĝis konsiderinde. Sed la postulo de art. 10 de la kongresa rezolucio „presi konvenajn materialojn por komencantoj“, ankoraŭ ne estas plenumata. La manko de vortaroj same bremsas la disvastigon de la abonintaro.

La organizita plenumo dum la kuranta jaro de la jarkunvena kampanjo estas montriĝo de la pli alta nivelo de la organiza laboro de la societoj kaj de CK. En 37 jarkunvenoj partoprenis membroj de CK de BEA aŭ ĝiaj rajtigitoj. Ni ne povis helpi tiurilate nur al tiuj s-toj, kiuj ne sciigis, aŭ sciigis malfrue pri la efektiviĝota kunveno. Ni havas de 60 societoj informojn pri la okazintaj kunvenoj. Pri la plimulto da ili la antaŭpreparo kaj la okazigo estis pli sistemaj kaj organizitaj ol ĉiam antaŭe. La kunvenoj estis kompare bone vizititaj — 50—100%. En vil. Ljubimec (Distr. Ĥaskovo) la nombro de la ĉeestantoj estis pli granda ol tiu de la membroj. En la plimulto da raportoj la estraroj konsideris la instrukciojn de CK en la speciala cirkulero. Ili estis pli riĉenhavaj kompare al la pasintaj jaroj, pli komplete estas respegulita la kompleksa agado de la societoj kaj la esperantistoj. Unuan fojon ekzemple estis tuŝita la demando pri la internacia korespondado, estas farita provo ĝeneraligi tiun fundamentan agadon de la esperantistoj kaj doni konsilojn pri la temaro kaj la maniero de korespondado. En la raporto de la estraro en Mezdra oni prezentas ekzemplojn de leteroj. La plimulto da kunvenoj voĉdonis rezoluciojn, en kiuj ili difinis la antaŭstarantajn taskojn. La neagemaj estraroj estis ŝanĝataj. Multloke eniris la estrarojn konsiderinda nombro da junuloj (Ljubimec, Svilengrad, Varna, Poljanovgrad, Jambol). La partopreno de la virinoj estas pli malofta. Estas estraroj en kiuj entute mankas virinoj. Ekz. en Loveĉ inter la nove elektitaj estraro, kontrola komisiono kaj trio da korespondantoj ne figuras eĉ unu virino. Similaj faktoj ekzistas ankaŭ en aliaj s-toj. Ni devas likvidi tiun mankon!

Sed ne ĉie la antaŭpreparo de la jarkunvenoj estis bona. Konsiderinda parto de la estraroj ne pridiskutis en

kunsidoj la cirkuleron de CK. Eĉ la membroj de la estraro, krom la ricevinta ĝin, ne sciis pri ĝia ekzisto (Sliven, Poljanovgrad, G. Orjaĥovica, Târgovište ka). Kompreneble tio donis stampon kiel al la preparo de la kunveno, tiel ankaŭ al la raporto. Estas nepre necese foje por ĉiam starigi praktikon pristudi en la unua regula kunsido ĉiujn instrukciojn, cirkulerojn, leterojn de CK. Pri ili devas esti informataj ĉiuj membroj de la estraro, decidi entreprenojn por ilia plenumo. Nature, estraroj ne pristudintaj la cirkuleron ne povis prezenti kompletajn, kritikhavajn raportojn kun proponoj pri deflankigo de la mankoj kaj plibonigo de la agado. La raporto ekzemple de tia granda s-to kia s-to „Nigra Maro" en Burgas ampleksis nur paĝon kaj duonon. Kompreneble en tia konciza ekspozo ne povas havi lokon eĉ provo pri analizo de la kompleksa organiza laboro, de la kulturkleriga laboro, de la internacia korespondado, de la instruado ktp.

En la analizo de la organiza vivo oni povas vidi, ke parto de la societoj okazigas semajnajn kunvenojn, alia monate, tria — entute ne kunvenigas la membrojn, aŭ de okazo al okazo, aŭ— plej malbone — de jarkunveno al jarkunveno. La plimulto de la aktivaj societoj laboras laŭ tri — aŭ kvarmonataj planoj. Tamen la regulaj semajnaj kunvenoj estas planataj konsekvence nur de la sofia s-to „M. Gorkij" kaj de la Plovdiva „Kulturo". Ili ĉiusemajne faras referaĵojn pri diversa temaro: esperanta, socipolitika kaj scienca. La raportoj kompreneble estas legataj en Esperanto, la diskutoj — same. Tiun formon oni povas praktiki nur la pli grandaj societoj, en kiuj ekzistas granda amaso da bone parolantaj la lingvon. Aliaj s-toj praktikas liberan konversacion aŭ okazigas tiujn kunvenojn kiel kurson por progresintoj. Ili nur de tempo al tempo okazigas klerigajn kunvenojn kun raportoj. Ĉar nia agado estas ligita kun la lerno de la lingvo ni rekomendas la regulajn semajnajn renkontiĝojn por praktikado de la lingvo. Sed por ke la laboro estu rezultodona kaj ke la kunvenoj estu pli bone preparataj, ankaŭ ilin oni devas plani, elektante plej konvenajn por certa s-to formojn. La formoj povas esti tre variaj: „viva gazeto", kurso por perfektiĝo, lingva lekciaro, mallongaj referaĵoj pri diversaj problemoj, rondoj (pri lingvaj demandoj, literaturo, historio de la E.-movado ktp). Ni ne devas forgesi ke krom la propagando kaj la disvastigo de la internacia lingvo nia fundamenta tasko estas ankaŭ la klerigo kaj socia eduko de niaj membroj. Sufiĉe ni toleris en nia medio strangulojn, „falintaj el la ĉielo", kiuj montras kompromitan malklerecon al socipolitikaj vivproblemoj. Tiaj kvazaŭpropagandantoj nenion kontribuas al la aŭtoritato de nia movado kaj ilia „propagando" havas negativajn rezultojn. Ni havas bonegan eblecon kune kun la okupoj pri la lingvo konatigi al niaj membroj la problemojn vigle interesantajn la socion en kiu ni vivas kaj laboras, interesantajn ĉiujn konsciajn civitanojn de nia socialisma patrolando. La socieduka laboro proponas al ni multe pli variajn formojn: amasaj ekskursoj, intersocietaj renkontiĝoj amuzvesperoj, artaj programoj, konkursoj, laborbrigadoj, kolektivaj vizitoj al teatraĵoj ktp. Meritas atenton la sperto de la Ĥaskovaj kaj Dimitrovgradaj s-toj en la organizado de intersocietaj renkontiĝoj. Ekzemple en la lasta tia renkontiĝo en Ĥaskovo la 14-an de majo partoprenis 160 personoj el 13 s-toj. La reprezentantoj de la apartaj s-toj sciigis sian sperton en tiu sfero de la agado en kiu ili atingis plej grandan sukceson. En la renkontiĝo parolis ankaŭ la prezidanto de la Distrikta Komitato por Paco en Ĥaskovo. Nature post tia renkontiĝo la gekamaradoj revenis entuziasmoplenaj kaj pliriĉigitaj per nova sperto.

Konsiderante la grandan signifon de la kulturkleriga agado por la socipolitika eduko de niaj membroj, pri ĝi devas respondeci aparta estrarano, sen-

depende de la estrarano pri propagando kaj kursoj. CK de BEA devas helpi la s-tojn per referaĵoj kaj raportantoj.

Estas malnova tradicio en la Esperanto-movado ĉiujare antaŭ la malfermo de la kursoj aŭ en alia konvena tempo organizi la tiel nomatan Verdan (propagandan) Semajnon. Estas rekomendinde daŭrigi tiun tradicion kaj tuj post la verda semajno malfermi kursojn. Ĉiu s-to laŭ la lokaj kondiĉoj devas difini konstantan tempon en la jaro por la malfermo de la kursoj, penante regule ilin kompletigi. Estas malutila la praktiko malfermadi kursojn en ĉiu tempo nur se kolektiĝis la minimuma nombro da gekursanoj.

Agante tiumaniere ni aldonas neseriozecon al tiu nia entrepreno kaj ĝia alloga forto malkreskas. Konsiderante la mankon de bone kvalifikitaj lektoroj ni ne devas troerigi la kursojn. La instruado de Esperanto en nia lando ĝenerale ne estas je alta nivelo. La bonaj lektoroj estas malofta fenomeno. Konsiderante la mankon de lerniloj oni povus kompreni la altan gradon de respondeco de la instruantoj de Esperanto. Ilia laboro devas esti rekompencata laŭmerite kaj depende de la rezultoj. Tiumaniere oni kuraĝigu, instigu la spertajn lektorojn. Krome kiel la s-toj, tiel ankaŭ CK devas periode organizi aranĝojn por plialtigo de la kvalifiko de la instruantoj—kursoj, seminarioj, pridiskuto de diversaj instrumetodoj, de apartaj lekcioj, de interpretigo de iuj gramatikaj demandoj kaj ĝia prezento al la gekursanoj, reciproka vizitado de la lektoroj por interŝango de sperto, pedagogiaj konferencoj de la instruantoj de kelkaj najbaraj s-toj, modelaj lekcioj ktp.

Ofte post la fino de la kurso la gekursanoj disiĝas. Neniu ilin serĉas, kaj ili ne scias kiun serĉi. Tio similas al konstanta enverŝado en senfundan barelon. Jam en la mezo de la kurso aŭ en la dua duono devas esti lekcio pri la Esperanto-movado, oni devas konigi al la gekursanoj la strukturon de la asocio, la agadon de la loka s-to, la esperantan gazetaron kaj aliajn eldonaĵojn. La aktivuloj de la s-to devas kontaktiĝi kun la gekursanoj jam en la daŭro de la kurso, oni invitu ilin partopreni en iu aranĝo, tiumaniere al la fino de la kurso ili estu komplete preparitaj kaj jam antaŭ ĝia fino konsiderinda parto da ili estiĝu membroj.

Karaj gekamaradoj! Ni ne havas kaŭzojn malkontenti pri la rezultoj de nia laboro, sed malgraŭ la sukcesoj ekzistas ankoraŭ multaj mankoj, parton de kiuj ni jam montris. Nia organo „Bulgara Esperantisto“ estas bonega konstanta tribuno por interŝanĝo de bona sperto, por kritiko de la mankoj. Ni utiligu ĝin! Tiumaniere ni marŝos senhezite antaŭen. Ni mobilizu niajn fortojn por kompleta plenumo de la decidoj de nia 34-a por ke ni gratulu nin per grandaj sukcesoj en la 35-a!

## LA NECESAN ATENTON AL LA MEMBROKOTIZO!

Multfoje ni emfazis, ke la regula pago de la membrokotizo estas la plej certa signo de bona, firma organizo. Por plifaciligi la societajn estrarojn kaj la membrojn la asocio akceptas ĝin je trimonatoj. Por la koncerna trimonato la societoj devas elŝuldiĝi ĝis la 10-a de la lasta monato de ĉiu monattrio, t. e. ĝis la 10-a de marto, 10-a de junio, 10-a de septembro kaj 10-a de decembro. Se ni sukcesus enpraktikigi tiun ĉi regulon ni havus firman, bone disciplinitan organizon kaj bonan financan ordon. Sed la societaj estraroj neglektas tiun regulon, rompas la financan kaj organizan disciplinon. Kio malhelpas? Nenio serioza, krom la manko de interna societa disciplino

Есперантско д-во *„Солидарецо“*

гр. (с.) *Банкя (Софийски)*

*Дом на съпротивата (чрез Ранков)*

**София, п. к. 66**

**До ЦК на БЕС**

## ТРИМЕСЕЧЕН ОТЧЕТ

за издължен членски внос

Тримесечие *I, II, III, IV* на 1961 г. Общо членове *28*

От тях отчетени всичко *28* члена, както следва:

а) с пълен членски внос *21* члена, по *12* лв, общо *252* лв.

б) с намален членски внос *7* члена, по *6* лв. общо *42* лв.
(учащи се и войници)

---

Всичко постъпил членски внос в д-вото за *I, II, III, IV* тримесечие *294* лв. 50% от тая сума *147* лв. са внесени в ЦК на БЕС със запис (ордер) № *19* от *28 май* 196*1* г.

Касиер: *О. Кусева* Председател: *Ив. Ранков*

печат

Есперантско д-во *„Нова войо“*

гр. (с.) *Димитрово п. к. 81*

**София, п. к. 66**

**До ЦК на БЕС**

## ТРИМЕСЕЧЕН ОТЧЕТ

за издължен членски внос

Тримесечие ~~I~~, *II*, ~~III~~, ~~IV~~ на 1961 г. Общо членове *34*

От тях отчетени всичко *25* члена, както следва:

а) с пълен членски внос *20* члена, по *3* лв. общо *60* лв.

б) с намален членски внос *5* члена, по *1,5* лв. общо *7,5* лв.
(учащи се и войници)

---

Всичко постъпил членски внос в д-вото за *II* тримесечие *67,5* лв. 50% от тая сума *33,75* лв. са внесени в ЦК на БЕС със запис (ордер) № *78* от *8* юни 1961 г.

Касиер: *Васев* Председател: *Д-р Костов*

печат

kaj bona volo. Ĝis nun la asocio postulis la nomaron de la kotizintaj membroj. Tio jam ne estas necesa. Por simpligi la laboron de la kasistoj ni enkondukas novan, tre simplan formularon, kiun la societoj devas sendi al ni kune kun la sumo. Unu ekzemplero de la formularo restas en la societa arĥivo por kontrolo. Sen tia formularo ni ne signos la kotizon kiel pagitan, ĉar ni ne posedos la necesajn informojn pri tio.

En p. 7 ni prezentas du modelojn de plenigo de la formularoj: la unua estas por unu monattrio, la dua — por kvar.

De la supraj ekzemploj estas klare, ke per unu formularo oni povas sendi kotizon ne nur por unu monattrio, sed ankaŭ por kelkaj, laŭ la kutimo kaj tradicio de la societo mem. Sed ĉiuj kotizoj pagitaj per unu formularo devas rilati al unuj kaj samaj trimonatoj (monattrioj). Iam la societoj per unu sumo pagas kotizon al la asocio por diversaj periodoj de la jaro, ekzemple: 25 membroj — por la unua trimonato, 4 membroj — por la unua kaj la dua trimonatoj kaj unu membro por la tuta jaro. Ekzistas s-toj kiuj pagas ankaŭ por parto de la trimonato. Tio estas malpermesata. Se la societo ordinare kolektas la membrokotizon po trimonatoj, sed nur kelkaj membroj pagis por la tuta jaro, oni sendas al la asocio nur la parton por la koncerna trimonato, por kiu pagis la granda amaso da membroj, kaj la ceteran parton de la jarkotizo de la pagintaj por la tuta jaro restas en la societa kaso ĝis la ĝenerala pago por la dua trimonato, por la tria trimonato ktp. Alimaniere la regula kontado kaj kalkulado de la kotizoj estas embarasata.

Ni esperas, ke ĉiuj societaj estraroj bone pristudos tiun ĉi instrukcion kiu plisimpligas la tutan aferon kaj la alveno de la membrokotizo de la societoj al la asocio estos jam regula laŭ trimonatoj. Tio ege faciligos la asocion en ĝia organiza kaj propaganda laboro.

**Organiza Fako de CK de BEA**

**Banĉo Banov**

**RIVERO KAJ TORENTO**

**Torent' petola, eta sur rokoj fluas kaj**
**ŝaŭmante**
**babilante —**
**Jen kaŝas sin kaj jen aperas ĝi,**
**rapidas, serpentumas akva stri'**
**ja inter ŝtonoj, floroj, herboj mil' —**
**kaj al river' rigardas ĝi malsupren —**
**arĝenta, larĝa flukanalo**
**etendiĝinta en la valo:**
**— Ho, akvon se mi havus kiel vi,**
**mi flugus, de la bord' al bordo ĉi,**
**mi bruus, ŝaŭmus kun facil' —**
**kaj tuj ekscius tuta mond'**
**— mi fluas en ĉi region'!**
**Sed kial estas tia vi—delonge mi cerbumas—**
**trankvila kaj senbrua?**
**Kviete la river' al la torent' sugestis:**
**— Ĉar mi profunda estas!**

Tradukis: G. Jordanov

# REZULTATOJ DE LA UNUA ETAPO DE LA ORGANIZA KONKURADO

En la unua numero de la k. j. de „Bulgara Esperantisto" CK de BEA publikigis la kondiĉojn de nova organiza konkurado 1961—62 (ĝis la 35-a kongreso) por la transira flago de CK de BEA. Multaj societaj estraroj pridiskutis la kondiĉojn kaj bone organizis sian partoprenon en la konkurado, sed aliaj ne faris tion kaj postrestis. Ĉi sube ni publikigas la atingitajn rezultojn de tiuj s-toj, kiuj superis la 60-procentan plenumon de la plano. La ceteraj perdas la rajton partopreni en la konkurado. Sed ne ĉio estas perdita. Se ili strečos la fortojn kaj dum la dua etapo atingos pli ol 120-procentan plenumon ili reakiros la rajton de partopreno. La membro por kiu estas pagita al la asocio la kotizo nur por unu monattrio estas konsiderata duono. Estas konsiderataj nur la kotizoj pagitaj al la asocio ĝis la 10-a de junio, laŭ p. 5 de la kondiĉoj. La rezultatojn de la dua etapo ni publikigos en la januara numero.

| № laŭ la grado de plenumo | Loko kaj nomo de la societo | membroj | abonantoj | % plenumo |
|---|---|---|---|---|
| 1 | Stara Zagora — „Verda Stelo" | 98 | 73 | 193,4 |
| 2 | Dimitrovgrad — „Flamo" (fabrika s-to) | 62 | 63 | 182,5 |
| 3 | v. Polski Trâmbeš (Târnovo) — „Progreso" | 32 | 48 | 149,3 |
| 4 | Burgas — „Nigra Maro" | 136 | 91 | 144,7 |
| 5 | Levski — „Trumpetisto" | 28 | 27 | 135,8 |
| 6 | Trojan — „Balkana Stelo" | 29 | 17 | 125,4 |
| 7 | Tolbuhin — „Paco" | 44 | 34 | 123 |
| 8 | Vraca — „Sukceso" | 64 | 60 | 120,7 |
| 9 | Stanke Dimitrov — „Marek" | 66 | 41 | 118,6 |
| 10 | Samokov — „Rila Esperantisto" | 51 | 12 | 115 |
| 11 | Kjustendil — „Flamo" | 48 | 29 | 108,3 |
| 12 | Sevlievo — „Fratiga Stelo" | 60 | 24 | 106,7 |
| 13 | Ĥaskovo — „Asen Zlatarov" | 39 | 32 | 102,1 |
| 14 | Părvomaj — „D-ro Zamenhof" | 20 | 16 | 100 |
| 15 | Ĉirpan — „Mondamikeco" | 20 | 14 | 96,7 |
| 16 | Velingrad — „Stojo Kalpazanov" | 14 | 23 | 88 |
| 17 | Vidin — „Espero" | 16 | 18 | 84,9 |
| 18 | Mezdra — „Vapcarov" | 23 | 12 | 81,3 |
| 19 | v. Ljubimec (Ĥaskovo) — „Ruĝa Stelo" | 16 | 10 | 73,3 |
| 20 | Ruse — „Libero" | 34 | 57 | 72,7 |
| 21 | v. Bankja (Sofio) — „Solidareco" | 29 | 5 | 72,7 |
| 22 | Plovdiv — „Kulturo" | 122 | 183 | 72,5 |
| 23 | Asenovgrad — „David Sasonov" | 60 | 36 | 70,2 |
| 24 | Botevgrad — „Ĥristo Botev" | 20 | 6 | 70 |
| 25 | v. Batak (Pazarĝik) — „Petâr Toŝkov" | 19 | 2 | 69.4 |
| 26 | Pleven — „Eterna Amikeco" | 48 | 46 | 68,3 |
| 27 | v. Pordim — „Verda Stelo" | 20 | 18 | 66,7 |
| 28 | Razgrad — L. L. Zamenhof" | 24 | 11 | 64,7 |
| 29 | Ruse — „Dimitrovec" (fabrika s-to) | — | 32 | 64 |
| 30 | Kazanlâk — „Roza Valo" | 120 | 20 | 63,3 |
| 31 | Sofio — „Printempo" (Urba Transporto) | 39 | 3 | 61,7 |
| 32 | v. Borima (Loveĉ) — „Nova Mondo" | 72 | 10 | 61,4 |

Organiza Fako de CK de BEA

HEROA PASINTECO

## LA UNUA „PURIGO" DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO EN 1927

En la somero de 1925 komenciĝis la stabiligo de la kapitalisma sistemo en Bulgario. Tamen la stabiligo estis provizora, mallongdaŭra kaj netuteca. Ĝi tute ne atestis pri malapero de la ĝenerala krizo de la kapitalisma sistemo en tutmonda skalo, sed estis nur transira etapo al pliakrigo de la nesolvitaj kontraŭdiroj. En la sino de tiu stabiligo maturiĝis novaj klaskonfliktoj, ĉar la kapitalismo estis daŭre graveda per antagonismaj fortoj, kiuj kreskis kaj interpuŝiĝis kaj ĉiam pli kaj pli akre kontraŭstariĝis unu al la alia. Tiu etapo finiĝis en 1929, kiam eksplodis la Tutmonda Ekonomia Krizo.

Jen ekzemple la antaŭmilita nivelo de la kampara mastrumo estis restarigita en la fino de 1925, sed restis nesolvita la „malsato" de la malriĉaj vilaĝanoj pri terenoj. Mankis agrara reformo. Kreskis la nombro de la kamparaj proletoj kaj duonproletoj. La malriĉaj vilaĝanoj rapide perdadis siajn malgrandajn bienojn, kiuj transiris iom post iom en posedo de la riĉaj bienuloj.

Konforme al la nova „trankvila" etapo en la evoluo de nia lando la ega burĝaro decidis ŝanĝi la brutan registaron de la profesoro murdisto — Al. Cankov. La nova registaro ekfunkciis je la 4-a de januaro 1926 kaj estis gvidata de la Ministro-Prezidanto Andrej Ljapĉev. Ĝi devenis el la sama faŝista partio „Demokratiĉeski Sgovor" („Demokrata Konkordo"), kiel la antaŭa registaro kaj starigis al si la samajn taskojn, sed provis ilin solvi per nova agmaniero. En ekstera politiko ĝi estis orientita al Anglio. Por akceli la stabiligon de la bulgara kapitalismo en la industrio la nova registaro larĝe malfermis la pordojn de nia lando por investado de la fremda kapitalo. Tamen la fremdaj kapitalistoj plej ofte evitis investi en la industrion kaj preferis la komercon kaj bankaferojn.

Krom tio la fremda kapitalo postulis duoble pli altan interezon ol ĝi ricevis en Anglio kaj Usono. La bulgaraj kapitalistoj fariĝis perantoj aŭ komizoj de la fremda kapitalo, kiu komencis pograndan ekspluatadon de nia laborema popolo. Estis evidente ke tia peza ekspluatado, kies unika najbaro estis la rabado, provokis energian kontraŭstaron fare de la laboristoj kaj vilaĝanoj.

En la interna politiko ĝi laŭte proklamis sian farisean devizon: „So krotce, so blago!", kiu en Esperanto signifas „Politiko per batoj ne taŭgas por ŝtatoj!" Kaj fakte estis sentebla iom da moliĝo en la formo de la regado, sed per tio la burĝaro deziris gajni la simpation de la popolo. La kapitalistoj tamen ne sukcesis, ĉar la popolo komprenis ke temas pri nova burĝa ruzaĵo.

La Bulgara Komunista Partio ekzistis eksterleĝe kaj agadis sekrete. En la fino de 1926, iom antaŭ la balotoj por komunumaj kaj distriktaj konsilantaroj, ĝi sukcesis starigi „senpartiajn grupojn" en preskaŭ ĉiuj urboj kaj vilaĝoj. Post la balotoj, en februaro 1927 estis kunvokita tutŝtata konferenco de la „senpartiaj grupoj", kiuj decidis fondi Bulgaran Laboristan Partion. En la somero de la sama jaro ĝi gvidis la strikon de la tabaklaboristoj en Sofio, kiu estis la plej granda post la septembra ribelo en 1923. En majo 1928 ankaŭ la eksterleĝa Komsomolo trovis laŭleĝan formon de agado per la fondo de Laborista Junulara Asocio.

Kio okazis tiutempe en la bulgara Esperanto-movado? La Esperanto-movado dum tiu periodo estas karakterizita per atako de la „neŭtralaj" kaj faŝistaj esperantistoj kontraŭ la gvidantaj komunistoj kaj progresemaj esperantistoj en nia asocio kaj ĝiaj filioj en la lando. La unuan, plej urĝan taskon, kiun ili starigis al si estis la fo-

rigo de k-do P. Kolev. Kiel jam konate, k-do P. Kolev estis sekretari-korespondanto de Komunista Esperanto-Grupo, „Balkana Liberiga Stelo“ en Sofio, kiun membris ankaŭ multaj k-doj el aliaj loĝlokoj. Depost la XI-a landa Esperanto-Kongreso (en Ruse, 1924) li fariĝis ankaŭ sekretari-kasisto de Bulgara Esperantista Asocio. Malgraŭ la malfavoregaj socipolitikaj cirkonstancoj kaj spite al la kontraŭstaro kaj malhelpoj fare de la „naciaj“ kaj tolstojistaj medioj inter la esperantistoj, li alte tenis la verdan standardon en daŭro de tri asociaj jaroj (de 1924/25 ĝis la fino de 1926/27).

La oficiala kaj „fundamenta“ akuzo kontraŭ k-do P. Kolev estis la malbona gvidado de la asocia financa politiko. Tiu akuzo entenis parton de la vero. En la fino de 1926 la asocio eniris en pezan financan krizon; ĉar ĉirkaŭ 120 privataj personoj kaj lokaj Esperanto-grupoj ŝuldis al ĝi pli ol 100 000 levojn kaj la asocio mem siaflanke ŝuldis 50 000 levojn al la presejo ka. La asocio estis trafota de bankroto. Al la akuzito estis malfacile sin defendi kaj la XIV-a landa Esperanto-Kongreso okazinta en Plovdiv en 1927 forigis k-don P. Kolev el la konsisto de la Centra Komitato. Tio estis peza bato ne nur al la Komunista Esperanto-Grupo, sed ankaŭ al la Esperanto-movado, ĉar sekretari-kasista posteno de la asocio estis okupita de la faŝista kapitano St. Radev.

La plej „energia“ akuzanto de k-do P. Kolev estis Dim. Simeonov, kiu pli frue sekretariis la asocion. En bulgarlingva tolstojista gazeto „Svoboda“ („Libero“) li aperigis du artikolojn, per kiuj li rekte agitis kontraŭ la asocia sekretari-kasisto k-do P. Kolev kaj apelaciis al la esperantistaro ke oni forigu lin el la respondeca posteno („Svoboda“, n-ro 160 de 17. 12. 1926 kaj n-ro 170 de 27. 2. 1927). Lia kritiko estis aplomba, sed malsincera kaj ruiniga. Li kontraŭstariĝas al salajrata sekretario, predikas kontraŭ k-do Kolev pro la plorinda stato de la asociaj financoj kaj eĉ iom aludas pri lia politika konduto.

En la lasta jaro de sekretariado de Dim. Simeonov (kiam li mem estis pagita sekretario), li ardege defendis la tezon, ke oni devas jam salajri ne nur la sekretarion, sed estas necese dungi unu plian oficiston („Bulgara Esperantisto“, jaro V, n-ro 9 de majo 1924 kaj n-ro 11—12 de julio-aŭgusto 1924).

Ne estas sincera Dim. Simeonov ankaŭ pri la ŝuldoj de la debitoroj al la asocio. Li akuzas senindulge, sed li mem atente silentegas pri tio, kion li — kiel estinta sekretari-kasisto — heredigis al sia anstataŭanto. Kaj la heredaĵo tute ne estis enviinda. Laŭ la jarraporto de CK pri la agado dum 1922/23 (kiam Dim. Simeonov estis asocia sekretario) privataj personoj ŝuldis al la asocio preskaŭ 9000 levojn. Krom tio la montrita neta profito de 24000 levoj estas dubinda, ĉar ĝi „estas aldonata“ (kiel ne aldonita?) al la asocia kapitalo („Bulgara Esperantisto“, jaro V, n-ro 11—12 de julio-aŭgusto 1924). Kaj ne estas aldonita, ĉar ne estas finricevita la tuta monsumo. Ĝi estis ŝuldata de diversaj lokaj Esperanto-grupoj.

La XI-a landa Esperanto-Kongreso okazis je la 27—29 de julio 1924 (en Ruse), la distribuo de la laboro inter la membroj de noveelektita CK de BEA okazis je la 3-a de septembro („Bulgara Esperantisto“, jaro VI, n-ro 1 de septembro 1924), kiam k-do P. Kolev estis elektita kiel sekretari-kasisto, sed tio estis nur formalaĵo. Dim. Simeonov daŭre sekretariis kaj eĉ en la sekvinta numero de „Bulgara Esperantisto“ (jaro VI, n-ro 2 de oktobro 1924) li aperigis siajn adreson kaj anoncon per kiu li invitas la grupojn kaj la privatajn personojn pagi siajn ŝuldojn al la asocio, kiuj sumiĝas al „proksimume 20000 levoj“. K-do P. Kolev transprenis la postenon en la mezo de oktobro 1924 kaj estas tute evidente, ke li „heredis“ malbonajn financaferojn. („Bulgara Esperantisto“, jaro VI, n-ro 10 de julio 1925).

Tiuj aferoj pri la ŝuldoj de ĉiuj debitoroj al la asocio ne estis konataj dum la XI-a landa Esperanto-Kongreso, ĉar kiam la kongresa prezidanto invitis la Kontrolan Komitaton por ke ĝi legu sian raporton „evidentiĝis tamen, ke neniu ano de la komitato ĉeestas, kaj ke kontrola raporto entute ne estas skribita. Tumultoj kaj protestoj. La kongreso rezolucias akran riproĉon al la Kontrola Komitato pro neplenumita devo" („Bulgara Esperantisto" jaro VI, n-ro 1 de septembro 1924). Tia estis la vero, sed multaj facile ĝin forgesis kaj iom poste ĉion malbonan alkroĉis al k-do P. Kolev.

Tamen la ĉefa kaŭzo pri la financaj malsukcesoj de la asocio kuŝas en la malfavoraj politikaj cirkonstancoj, kreitaj de la faŝisma reĝimo.

Dim. Simeonov dum sia sekretariado de la asocio en 1923/24 ne povis kolekti 20000 levojn de la asociaj debitoroj. K-do P. Kolev daŭrigis agadi ĉe la samaj malfavoraj socipolitikaj cirkonstancoj kreitaj depost ekposedo de la ŝtatpotenco en 1923 fare de la faŝistoj. Kaj ĉiujare per la sama grado malbonsukcesis la financa stato de la asocio, sed dum la sekretariado de k-do P. Kolev estis pli vigla la propaganda agado de la asocio kaj tio havis historian signifon por la konservo de nia asocio. Krom la imponaj „verdaj semajnoj" aranĝataj en la aŭtunoj estis aranĝataj modelaj „distriktaj konferencoj", kiuj kontribuis por plua penetrado de nia movado en nian popolon.

Paralele kun „Bulgara Esperantisto" aperis en daŭro de unu asocia jaro (1925/26) la propaganda bulgarlingva gazeto „Esperanto" (dusemajne), kiu helpis al nia movado konsiderinde. Sed konsiderindaj estis ankaŭ la perdoj de la asocio de ĝia eldonado, ĉar duono de la abonantoj ne bonvolis pagi sian kotizon. Dum la sekretariado de k-do P. Kolev estis eldonitaj belaj dukoloraj murkalendaroj, kiuj havis netakseble grandan propagandan signifon, sed ankaŭ de ili la asocio perdis. En la aŭtuno de 1924 estis eldonita bulgarlingve unuopa numero de propaganda gazeto „Esperanto" de kiu la asocio ankaŭ perdis („Bulgara Esperantisto", jaro VI, n-ro 3—4 de novembro-decembro 1924). Grandskala estis ankaŭ la eldonado kaj distribuo de diversspecaj propagandaj afiŝoj ktp.

Kaj tute nature pro la malbonaj financaferoj dum la sekretariado de Dim. Simeonov, kiujn li „testamentis" al la nova sekretario oni ekparolis pri manko de mono jam en la fino de 1924 kaj en la printempo de 1925 („Bulgara Esperantisto", jaro VI, n-ro 3—4 de novembro-decembro 1924 kaj n-ro 7 de majo 1925). Unu jaron poste (en majo 1926) la tiama prezidanto de la asocio Georgi Aktarĝiev verkis artikolon „Kiu bremsas kaj difektas?" en kiu li konigas ke „tiu financa maldisciplino, tiu organiza malkorekteco profunde enradikiĝis kaj komenciĝis jam en la pasintaj jaroj, ĉar ankaŭ nun amaso da sekcioj, amaso da apartaj samideanoj, perantoj, librovendistoj kaj ŝuldantoj al la asocio havas nearanĝitajn kontojn pri ŝuldoj, faritaj de ili antaŭ 4—5 jaroj. Malnovaj ŝuldoj, kiuj certe jam estas nekolekteblaj — pereintaj pro kulpo de pasintaj sekretarikasistoj kaj pro malbone gviditaj organiza kaj financa politikoj („Esperanto" bulgarlingva, jaro I, n-ro 18 de 1926).

Estas jam tute klare ke la prifinanca akuzo kontraŭ k-do P. Kolev estas nur videbla preteksto. La esenca kaŭzo estis la politikaj motivoj. Tion atestas At. D. Atanasov — ADA, kiu en la artikolo „La lasta antaŭkongresa parolo" diris tion pri kio li silentis tri jarojn. „En la eksterordinara kongreso mi aludis ke io plia estas dirinda por ke oni komprenu, kiel ni atingis tiun plorindan staton, sed ne estas oportune kaj konvene paroli malkaŝe pri tiu demando. Kion mi prisilentis, diris ĝin nia malnova samideano Milĉo Georgiev: ĝis kiam ni ne apartigis nin en la movado je partioj kaj ni neinteresiĝis pri kiu kiajn politikajn konvinkojn konfesas, la afero progresis. De kelkaj jaroj tamen unu grupo da esperantistoj divi-

das la samideanojn je „niaj“ kaj „ne niaj“ kaj kreis unu duoblecon, de kiu por la movado oni povas atendi nur malutilon.

Bedaŭrinde tiel estas. Kiu observis la evoluon de la aferoj de antaŭ kelkaj jaroj ĝis nun, li scias, ke ĉiam en la kongresoj aperas unu frakcio-organizita anticipe, sekrete — kiu sisteme klopodas domini.

Jam post la XI-a Kongreso (1924), kiam la sofiaj delegitoj raportis al la sekcio en Sofio, mi decidis, ke oni ne devas silenti plu: tiujn aferojn oni devas konigi al ĉiuj esperantistoj kaj la minacanta malbono estu forigita“ („Bulgara Esperantisto“, jaro VIII, n-ro 7—8 de aŭgusto 1927).

Konforme al tiu kompreno la grupo de la „neŭtralaj“ esperantistoj obstrukciis la funkciadon de la Centra Komitato per „eksiĝoj“. Unue eksiĝis la prezidanto de la asocio G. Aktarĝiev („Bulgara Esperantisto“, jaro VI, n-ro 2 de oktobro 1924) kaj poste eksiĝis la vicprezidanto de la asocio At. D. Atanasov — ADA („Bulgara Esperantisto“, jaro VI, n-ro 10 de junio 1925): Antaŭ la XIII-a Kongreso nia asocio havis nek prezidanton, nek vicprezidanton. La plej alta posteno en la asocio estis la sekretari-kasista, okupita de k-do P. Kolev, ĉar la prezidanta kaj vicprezidanta restis vakaj. Komplote la kontraŭkomunistaj fortoj planis forigon de k-do P. Kolev el la Centra Komitato. Detalaĵojn pri tio ni ekkonas de letero, sendita el urbo Ruse (je la 11-a de julio 1925) al k-do P. Kolev. De ĝi ni ekscias ke je la 9-a de julio okazis kunsido de Esperanto-grupo „Espero“ en Ruse, kiu esprimis sian malkontenton al k-do P. Kolev pro tio, ke li komisiis al k-do Iv. Kovaĉev saluti, je la nomo de la bulgaraj esperantistoj la kongreson de la abstinenculoj, okazinta en Ruse. Plue la kunsido kondamnis k-don P. Kolev, ke li estas malkapabla por la sekretaria posteno de la asocio, ke li estas „kulpanto“ ĉefa koncerne la eksiĝoj de Aktarĝiev kaj Atanasov (ADA), ke li ne plu rajtas gvidi la asocion, ĉar laŭ la esprimo de St. Uzunov — k-do P. Kolev estas „kontraŭleĝulo“ kaj „komunisto gvidanta“. La elektitaj 6 delegitoj por la kongreso havis mandaton voĉdoni kontraŭ k-don P. Kolev. Kaj preskaŭ en la fino la aŭtoro de la letero zorgoplene alvokas: „Sciigante al vi la supran, vi, komitatanoj estimataj, mia devo esperanta malsilentas kaj alvokas vin: kunvenu kaj konsiderante ĉion primeditu kaj vi prepariĝu bone luktadi la malamikojn, celantajn detrui la tutan Centron“.

Estas, do tute klare, ke la neŭtraluloj kaj faŝistoj kontraŭstariĝis al la agado de k-do P. Kolev jam ek de la komenco de lia sekretariiĝo pro motivoj politikaj. Ili ne sukcesis realigi tuj sian intencon pri forigo de k-do P. Kolev el la Centra Komitato, ĉar ili ne havis la subtenon de la ordinaraj esperantistoj. Tamen la soci-politikaj cirkonstancoj estis pli favoraj por ilia agado kaj post trijaraj klopodoj ili fine sukcesis.

**Canko MURGIN**

---

***GEKAMARADOJ,***

***Partoprenu aktive en la brigadoj helpe al la Agrikulturaj Kooperativoj! Sekvu la ekzemplon de la Esperantistaj Societoj en Sofio „Maksim Gorkij“, en Stara Zagora kaj Pazarĝik! Poste raportu al la redakcio pri la rezultoj de la laboro kaj konkrete pri la plej fervore partoprenintaj!***

---

# LA HISPANA CIVILMILITO KAJ LA ESPERANTISTOJ EN VARNA

La 18-an de julio 1936 eksplodis la civilmilito en Hispanio. La faŝista generalo Franko ribelis kontraŭ la demokratia registaro de la Popola Fronto. La faŝistoj bestece venĝadis al la heroa loĝantaro de demokratia Hispanio. Helpis al Franko per armilaro kaj „volontuloj" liaj kunfratoj Hitler kaj Musolini. La tiamaj anglaj kaj francaj registaroj deklaris „neŭtralecon" kaj kreis la malbonfaman „Komitaton por Neinterveno". Per tio ili kontribuis al la internacia faŝismo frakasi la demokration en Hispanio. La tuta progresema homaro observis kun deteno de la spiro la marŝon de la milito. Ĝi ĝojis kiam la respublikanoj havis venkojn kaj ĉagrenis dum ofensivoj de la faŝistoj. Neniam ni forgesos Malaga kaj Grenada, Teruel kaj San-Sebastian, Madrid kaj Valencia.

La esperantistoj kiel adeptoj de internacia kompreniĝo kaj solidareco ĉiam okupis antaŭan lokon en ĉiuj internaciaj antifaŝistaj kampanjoj. Ili ne restis flanke ankaŭ de la hispana milito. En la internaciaj brigadoj batalantaj kune kun la hispanaj demokratoj, oni amase lernis Esperanton. En Madrid, Valencia kaj Barcelono aperadis dekoj da ĵurnaloj, gazetoj, bultenoj kaj broŝuroj en Esperanto. La oficiala bulteno de la Ministerio de la Propagando aperis krom en aliaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Ni memoras la belan gazeton „Popola Fronto" kun la emblema pugno levita timige al la faŝistoj.

Tiu ĉi literaturo per la diversaj Esperanto-organizaĵoj estis disvastigata en la tuta mondo kaj ĝi radiis la veron pri la hispana milito en ĉiuj randoj de la terglobo. La esperantistoj-antifaŝistoj en Varna ne estis flankestarantaj, malgraŭ la faŝista diktaturo. Ili havis sian antifaŝistan grupon (eksterleĝan kompreneble) kiu regule kontaktis kun la Internacio de la Proletaj Esperantistoj (IPE) kaj precipe kun ĝia korespondcentro (PEK) en Edinburgo kun sekretario Bert Turner. Per ĝi ni ricevadis antifaŝistan literaturon de la tuta mondo, inkluzive de Hispanio kaj Ĉinio. Apartan atenton ĝuis la prihispana materialo. Ni tuj pristudadis ĝin, parton de ĝi ni tradukis por la gazetaro redaktante ĝin en konvena formo, por ke ĝi povu elŝteliĝi el la drakonaj ungegoj de la cenzuro, la cetera parto estis disvastigata de mano al mano, ĉu en traduko, ĉu en originalo. Estis organizita ankaŭ esperantista helplaboro. Ni kolektis monsumojn kaj ilin sendis al niaj samideanoj de la internaciaj brigadoj per Nederlando aŭ Britlando, kie funkciis specialaj Esperanto-servoj. Ni korespondis kaj penis per niaj leteroj kuraĝigi la batalantojn, ke ili sentu nian solidarecon. Ĉe diversaj okazoj kaj venkoj ni sendis gratultelegramojn kaj leterojn. La Komsomolo en Varna ankaŭ utiligis la servon de la esperantista antifaŝista grupo.

Jen kiel Esperanto praktike servis al la internacia proleta kaj antifaŝista solidareco. Tio estas nur ekzemplo de la multaj similaj aktivecoj. Ĝi klare montras, kian bonegan rimedon prezentas Esperanto en la manoj de la batalantaj popoloj, serve al la internacia solidareco. Nur en tia praktika laboro la esperantistoj povas pruvi ĝian taŭgecon kaj konkeri novajn ĉiam pli favorajn poziciojn.

**Violin OLJANOV**

D-RO AL. DAJSKI
supera scienca
kunlaboranto

## BULGARIO — LANDO DE MINERALAKVAJ FONTOJ KAJ BANLOKOJ

Bulgario estas unu el la landoj riĉe dotitaj de la naturo per kuracaj mineralakvaj fontoj. Sur sia malgranda teritorio ĝi havas ĉirkaŭ 500 diversspecajn minelalakvajn fontojn. Oni vere nomas ĝin „Lando de la mineralakvaj banejoj en sudorienta Eŭropo".

Bulgario abundas per malmulte mineraligitaj akvoj, kies temperaturo varias de 30,5 ĝis 100°C. La debito de la mineralakvaj fontoj estas sufiĉa por kuracado per banado,. trinkado ktp. La plej konataj mineralakvaj fontoj kaj banlokoj tiaspecaj estas „Gorna Banja", „Bankja", „Sofio", „Panĉerevo" „Varŝec", „Banja" apud Levskigrad, „Banja" apud Panagjuriŝte, „Banja" apud Burgas, „Velingrad", „Ĥisarja", „Sandanski" kaj multaj aliaj.

Estas ankaŭ riĉe mineraligitaj, malvarmetaj kaj malvarmaj mineralaj akvoj kun diversa konsisto kaj propraecoj: sulfat-alkalaj en vil. Meriĉleri, nur alkalaj — en Birimirci, feraj — en Breznik. Ekzistas ankaŭ fontoj, enhavoriĉaj je gasoj kaj elementoj, altvaloraj pro sia malofteco: karbonoksidaj — en vil. Miĥalkovo, sulfurhidrogena — en Slanotrân kaj Ŝabla, sulfidaj — en Kjustendil, Saparevo kaj Blagoevgrad, radioaktivaj — en Nareĉen kaj Momin Proĥod, fluoraj — en Ovoŝnik, jodaj kaj bromaj — en Skorpilovci kaj aliaj.

La bulgaraj mineralakvaj fontoj estas mondfamaj per siaj grandaj kurackvalitoj. Jam en antikvaj epokoj la tracoj, romianoj, bizancanoj kaj turkoj uzadis la mineralajn akvofontojn kiel kuracan kaj profilaktikan rimedon. Tion atestas la historiaj monumentoj el la pasinteco de multaj tiamaj banlokoj (statuoj, surskriboj, vazoj, moneroj, fundamentoj de bankonstruaĵoj). Tiurilate tre interesaj estas la nunaj kuraclokoj en Ĥisarja, Kjustendil kaj Sofio.

Por la evoluado de Bulgario kiel lando riĉa je banlokoj kontribuas ankaŭ aliaj faktoroj kaj kondiĉoj: favora kaj modere kontinenta klimato. En la suda landparto oni sentas la influon de la Mediteraneo kun multaj suntagoj dum la jaro, mildaj ventoj kaj maloftaj nebuloj; diverseco de la reliefo, de la flaŭro kaj faŭno; abundeco de vitaminriĉaj fruktoj kaj legomoj dum ĉiuj sezonoj.

En la lastaj jaroj oni kreis tre favorajn cirkonstancojn por kompleksa kuracado en la banlokoj — sanatorioj, ripozdomoj, kuraclokaj pensionoj (bone provizitaj per ĉio necesa por tiu ĉi celo). En ili oni ĝuas diversajn kulturajn amuzojn kaj distrojn.

Por la scienca progreso de la banterapio estis fondita Sciencesplora Instituto pri Kuracloka kaj Fizika Terapioj, katedroj ĉe la medicinaj fakultatoj (en Sofio kaj Plovdivo) kaj ĉe la Instituto por Specialiĝado kaj Perfektiĝo de la Kuracistoj (en Sofio).

La indikoj por la kuracado en la bulgaraj banlokoj estas diversaj: malsanoj de la apog-mova aparato, nerva sistemo, renŝtonetoj, kaj la parencaj al ili renkataraj malsanoj, ginekologiaj, stomak-intensaj, hepat-kaj gala kataroj kaj ankaŭ la kataroj de la supra spirvojo, malsanoj de la metabolo ka.

Bulgario rapide elstaras kiel lando kun abundaj banlokoj. Ĝiaj marbordaj regionoj, mineralakvaj fontoj kaj pitoreskaj freŝaeraj montaroj jam estas fame konataj kaj amase vizitataj de multaj fremdlandanoj por kuracado, ripozo kaj turismo.

Tradukis:
D-ro T. TODOROV —
supera scienca
kunlaboranto

## ORGANIZA VIVO

**STARA ZAGORA.** La 24-an de Majo la tuta klaso lernanta Esperanton kune kun sia klasinstruistino manifestis en aparta esperantista kolono. Gelernantoj portis la portreton de Zamenhof, la sloganojn „Ni lernas Esperanton" kaj „Per Esperanto ni havas kontakton kun la tuta mondo".

La 40 gelernantoj manifestante kantis en Esperanto „Popolo marŝu kaj prosperu!" kaj skandis „Esperanto — paco!"

La manifestantoj forte impresis al la lernantoj kaj civitanoj el Stara Zagora.

La 28-an de majo la Esperanto-Societo „Verda Stelo" organizis brigadon por helpi la lokan Agrikulturan Kooperativon. Pli ol 40 geesperantistoj partoprenis ĝin kaj tutan tagon kolektis ĉerizojn kaj faris aliajn kamparajn laborojn.

Tiun ĉi iniciaton de la Societo respegulis la loka gazeto „Septemvri" kaj la Radio Stara Zagora elsendis mallongan informon pri la brigado kaj pri la farita de ĝi laboro.

**Inĝ. D. Dobrev**

**JAMBOL.** Entuziasmigitaj de la grandega venko de la homaro — la enpenetro en la kosmoson je la Unua de majo la laboruloj el Jambol denove manifestis sian internaciisman solidarecon al la tutmonda laboristaro. Super la kapoj de la bunta anaro naĝas centoj da flagoj, portretoj kaj devizoj kun: „Saluton al la unua kosmonaŭto Gagarin!", „Saluton al nova Kubo!" ktp.

La kolonoj elverŝiĝas sur placo „Stalin" antaŭ la oficiala tribuno kaj ĉiu fieras pro siaj sukcesoj en la paca laboro. Kvazaŭ la ondoj de maro el homoj alvenas kaj retiras sin en la proksimaj stratoj lasante post si la multkoloran ŝaŭmon de la floroj.

En tiu solena manifestacio por unua fojo partoprenis ankaŭ la esperantistoj el la urbo. Cent junaj kaj maljunaj gesamideanoj deklaris sian pretecon aktive partopreni en la paca lukto por konstruo de la socialismo en nia lando, por feliĉa vivo de ĉiuj homoj.

**Dimo Trudoljubov**

**BURGAS.** La Esp.-societo „Nigra Maro" efektivigis utilan iniciaton — „oratora konkurso" inter la kursfinintoj. Partoprenis 11 novaj esperantistoj. Ĉiu rakontis en Esperanto unu okazintaĵon el sia propra vivo.

Apartan mencion meritas la eldiro de k-do Atanas Paraŝkevov — fervojisto, kiu rakontis en Esperanto pri sia renkonto kun Sovetaj soldatoj en 1945. Unu el ili deklamis tiam en Esperanto versaĵojn de Ĥr. Botev. Ĝis tiam Paraŝkevov sciis preskaŭ nenion pri Esperanto, sed tiu fakto ekinteresigis lin kaj fine li decidis lerni la lingvon. Dum la kuranta jaro li lernis en kurso kune kun sia filino kaj estis inter la plej diligentaj.

La ĉeestantoj atente aŭskultadis siajn novajn gekamaradojn kaj aplaŭdis ilin. La ĵurio montris kiel plej sukcese sin prezentintaj la gekamaradojn: At. Paraŝkevov, Stefanka Peĥlivanova — lernantino kaj Vesela Paraŝkevova — lernantino.

**N. Nigohosjan**

**LEVSKI.** La 31-an de aprilo en la bone ornamita salono de la muzika rondo en Levski, la loka Esp.-societo „Trumpetisto" kune kun la gelernantaj esperantistoj el la junaj muzikistoj organizis amuzan Esperanto-vesperon kun riĉa literatura kaj muzika programo. Gastoj al la vespero estis ankaŭ k-do Zdr. Velikov, prezidanto de la Esp.-societo en Pleven kaj docento Ĥr. Marinov el Sviŝtov.

La lernantoj de samideano J. Angelov — estro de la infana muzikista grupo malfermis la vesperon per la himno „la Espero" kaj ludis melodiojn el operoj kaj bulgarajn popolajn kantojn.

Tuj post la malfermo nia agema kamarado kaj kursgvidanto B. Markov faris mallongan, sed bone argumentitan paroladon: „Esperanto — fenestro al la mondo". Li estis ŝtorme aplaŭdita de la publiko. Sekvis deklamaĵoj de gekamaradoj: D-ro Ĥr. Belĉev, K. Uzunova, A. Slavova, N. Zaĥarieva kaj M. Velikov. Deklamis ankaŭ junaj novebakitaj geesperantistoj: G. Genova, Tr. Ilieva, Kr. Boŝnakov kaj aliaj.

La amuzvespero daŭris ĝis meznokto per ludoj kaj dancoj. La eĥo de tiu vespero estis tre granda. Pluraj gecivitanoj neesperantistoj fariĝis bonaj amikoj de Esperanto kaj esprimis sian deziron lerni la internacian lingvon.

**K. Uzunova**

**ĤASKOVO.** Laŭ iniciato de ĥaskov'a esperantista societo „Asen Zlatarov" la 14-an de majo en urbo Ĥaskovo okazis regiona esperantista renkonto. Malgraŭ la malbela vetero, ĉeestis pli ol 150 gesamideanoj el urboj Plovdiv, Stara Zagora, Pazarĝik, Harmanli, Dimitrovgrad, Svilengrad, Ĥaskovo kaj vilaĝo Ljubimec. Antaŭ tagmeze okazis konferenco por interŝanĝo de sperto. Malgranda ĥoro de dommastroj kantis kelkajn Esperanto-kantojn kaj oni deklamis poemojn de bulgaraj kaj Esperantaj poetoj. Poste la Prezidanto de Esp.-Societo „Asen Zlatarov" k-do Idakiev salutis la gastojn kaj proponis, ke ni okazigu pli ofte similajn renkontojn, ĉar ili helpas al la organiza stabiligo de la Esp.-societoj. La konferenco estis salutita de k-do Ŝarenkov, Prezidanto de la Distrikta Packomitato. La reprezentantoj de ĉiuj societoj rakontis pri sia organiza agado. Oni substrekis, ke la geesperantistoj per sia korespondado devas propagandi vaste la belecon de nia Patrujo, la sukcesojn de nia popolo

en la konstruado de socialismo. La oratoroj rakontis, ke ne ĉiuj societoj posedas klubejojn, mankas bone instruitaj kursgvidantoj. Oni raportis, ke la plano por varbado de novaj membroj kaj abonantoj al „Bulgara Esperantisto" estis plenumita. La membrokotizo por la unua duonjaro estas kolektita. Evidentiĝas la bezono pri pli intima ligo kaj kunlaboro kun la packomitatoj kaj aliaj amasaj organizaĵoj.

Je la nomo de CK de BEA k-do Iv. Batakliev salutis la ĉeestantojn kaj parolis pri la estontaj taskoj de la Esp.-societoj, pri la realigo de kongresaj decidoj.

Feliĉa koincido estis, ke pioniroj el Ĉinio, Ĉeĥoslovakio, Sovet-Unio kaj Germana Demokrata Respubliko, gastantaj en Ĥaskovo, vizitis la konferencon. Ili estis varme salutitaj kaj aklamitaj de la geesperantistoj. La renkonto finiĝis kun amuzoj kaj dancoj.

**Boris Kolev**

**RAZGRAD**

En la urbo okazis renkontiĝo inter la novaj esperantistoj, kiuj nun lernas Esperanton kaj malnovaj E-aktivuloj el Ruse kaj Kubrat. Ĥr. Dimitrov — kursgvidanto el Kubrat faris modelan lecionon kaj disdonis multajn adresojn de eksterlandaj korespondemuloj. P. Kolev rakontis impresojn pri siaj vizitoj en Varsovio, Latvio, Estonio, Leningrado kaj Moskvo.

**P. Nedelĉev**

**LOVEĈ.** En la unua kvarmonato k. j. en la vivo de Esperanto-societo „Espero" okazis du gravaj okazintaĵoj. La unua el ili estis la jarkunveno de la societo je 18 de marto. Raporton faris k-do M. Bliznakov, Prezidanto de la societo. En la societo membras 45 geesperantistoj. Dum la pasinta jaro ĝi efektivigis ĝojigajn sukcesojn. La societo ricevis monhelpon de 2000 levoj de la Distrikta Konsilantaro. Sur „La Kovrita Ponto" ni havas klubejon kaj propagandvitrinon kun esperantaĵoj el fremdlando. Funkcias 2 kursoj por komencantoj kaj progresintoj kun entute 25 kursanoj. Anoj kaj neanoj de la societo ricevas 82 diversajn Esperanto-gazetojn. Multaj geesperantistoj korespondas kun fremdlando.

La jarkunveno decidis, ke la estraro kaj la geanoj de la societo laboru pli sisteme inter la gejunularo kaj kolektu monon por la Esperanto domo en Sofio.

La geesperantistoj en Loveĉ promesis ankaŭ sindone labori per Esperanto por la plifirmigo de la paco inter la popoloj.

La dua momento estis la organizita kleriga kunveno je la 5-a de aprilo en lernejo „V. Levski". Ĉeestis 32 geesperantistoj. Belegan prelegon en Esperanto faris k-do At. Lakov, vicprezidanto de BEA, je temo: „Leninismo kaj la internacia lingvo". Bonege posedanta Esperanton kaj apogante sin sur la fundamentaj principoj de leninismo, k-do Lakov akcentis la neceson de helpa internacia lingvo, kiu ne celas anstataŭigi la naciajn lingvojn, sed povas esti taŭga kaj utila rimedo en la lukto por daŭra paco inter ĉiuj popoloj en la mondo kaj internacia interkompreniĝado.

La geesperantistoj atente aŭskultis la interesan prelegon. Ili metis multajn demandojn, al kiuj la lektoro konvinkige respondis. La geesperantistoj varme dankis al k-do Lakov pri la belega kaj interesa prelego.

**St. Fortunov**


## REDAKTA KOMITATO

Canko MURGIN (respondeca redaktoro), Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV, Kiril DRAĴEV, Simeon D. SIMEONOV, Violin OLJANOV

Korektis: P. Georgieva — Formato 71×100/16 — Eldonkvanto 3000 ekz.

Adreso: Bulv. Dondukov 57, Tel. 7-46-01, Sofio, Poŝtkesto 66

Ŝtata presejo „T. Dimitrov", filio 2 — Sofia mendo 7413

*Ĵus aperis kiel eldono de Ŝtata Eldonejo „Nauka i Izkustvo“ —Sofio*

**БЪЛГАРСКО-ЕСПЕРАНТСКИ РЕЧНИК**

**(BULGARA-ESPERANTA VORTARO)**

*Aŭtoroj: Atanas D. Atanasov, Iv. Sarafov, As. Simeonov, Dim. Simeonov. Tole bindita, papero luksa, p. 630, aĉetebla ĉe la ŝtataj librovendejoj, prezo 31,40 levoj.*

*Ĉiu bulgara esperantisto bezonas la ĵus eldonitan valoregan libron*

**СВЕТЪТ ИМА МЕЖДУНАРОДЕН ЕЗИК**

**(LA MONDO HAVAS INTERNACIAN LINGVON)**

*Aŭtoroj: Ivan Sarafov kaj Stefan Maŝârov. Paĝoj 98, prezo 5 levoj, havebla ĉe la lokaj esp. societoj kaj ĉe Bulgara Esperantista Asocio, poŝtkesto 66, Sofio, Bulgario.*

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL